

## 2-a DIMANĈO DE KARESMO - 21-a de februaro 2016

### DUM LI PREĜIS, LA ASPEKTO DE LIA VIZAĜO ALIIĜIS - Komento al la EVangelio de p. Alberto Maggi OSM

#### El la evangelio laŭ Luko 9, 28b-36

Ĉirkaŭ ok tagojn post tiu diro Jesuo prenis kun si Petron, Johanon kaj Jakobon, kaj supreniris sur la monton por preĝi. Dum Li preĝis, la aspekto de Lia vizaĝo aliiĝis kaj Lia vesto fariĝis blindige blanka. Kaj jen oni vidis du virojn interparoli kun Li. Ili estis Moseo kaj Elija, ĉirkaŭataj per ĉiela gloro. Ili parolis kun Jesuo pri Lia foriro, plenumota de Li en Jerusalemo. Petro, kaj tiuj, kiuj estis kun li, estis premataj de dormemo; sed vekiginte ili vidis la gloron de Jesuo kaj la du virojn, kiuj staris kun Li. Dum ĉi tiuj disiĝis de Li, Petro diris al Jesuo: "Estro, estas bone por ni esti ĉi tie! Ni faros tri laŭbojn: unu por Vi, unu por Moseo kaj unu por Elija!". Sed li ne sciis, kion li diras. Dum li ankoraŭ parolis, nuboj venis kaj superombris ilin, kaj ili timegis pro tio. Tiam el la nuboj venis voĉo proklamanta: "Ĉi Tiu estas mia Filo, mia elektito: aŭskultu Lin!". "Petro, kaj tiuj, kiuj estis kun li, estis premataj de dormemo; sed vekiginte ili vidis la gloron de Jesuo kaj la du virojn, kiuj staris kun Li. Kaj dum la voĉo ankoraŭ sonis, la disĉiploj konstatis, ke Jesuo estas sola. Ili restis senvorte, kaj al neniu en tiu tago ili rakontis pri tio, kion ili vidis.

Jesuo estis anoncinta al siaj disĉiploj, ke en Jerusalemo Li estos mortigita. Kompreneble tio kaŭzas protestojn, kaŭzas seniluziigon.

Tuj poste sekvas tiu ĉi teksto. Estas grava la precizigo pri la tempo. Luko skribas "*Ĉirkaŭ ok tagojn post tiu diro...*", do post la anonco pri Sia morto.

Kial nombro ok? La evangelistoj neniam aludas la morton de Jesuo ne menciante ankaŭ Lia neresurekton. La oka tago estas la tago de la resurekto de Jesuo (Lk 24,1). Do Jesuo montras nun, kio okazas al persono trapasanta la morton: ne estas detruo, neniigo, sed potenco.

"... Jesuo prenis kun si Petron,..." Luko uzas por li nur la malŝatan kromnomon, indikon de obstino "... Johanon kaj Jakobon... Ili estas la disĉiploj plej malfacile konvinkeblaj, kiujn Jesuo kunprenas en la gravaj momentoj de Sia vivo..., "... kaj supreniris sur la monton...". La artikolo montras, ke ĝi estas konata, sed ĝia nomo mankas. Luko ne intencas paroli pri geografio, sed pri teologio. La monto estas la loko de la ĉeesto dia, de la dieco.

"...por preĝi." Tio estas karakterizaĵo de Luko. Laŭ li, en la gravaj momentoj, Jesuo preĝas: *Dum Li preĝis, la aspekto de Lia vizaĝo aliĝis kaj Lia vesto fariĝis blindige blanka.* Tio montras la efikon de la morto anoncita pli frue en ĉi tiu ĉapitro (Lk 9, 22). La morto ne ĵetas en la mallumon, sed ĉirkaŭigas per lumo. La morto, kiel supre dirite, ne detruas personon, sed liberigas ĉiujn energiojn por amo kaj vivo.

"Kaj jen... (tipa esprimo de la evangeliistoj por antaŭanonci ion neatenditan, surprizon) ... oni vidis du virojn interparoli". *Ili estis Moseo kaj Elija,...* Kial Moseo kaj Elija? Ĉar ili estis la personoj parolintaj kun Dio en la Malnova Testamento: Moseo estis la granda leĝdonanto, Elija estis la profeto kiu fervore, kaj ankaŭ perforte, plenumigis la leĝon de Moseo.

"...ĉirkaŭataj per ĉiela gloro. Ili parolis kun Jesuo pri Lia foriro,..." Tiun vorton uzas Luko por aludi la liberigon portatan de Jesuo. "...plenumota de Li en Jerusalemo." En Jerusalemo, la sankta urbo, Jesuo estos murdita de la ĉefaj reprezentantoj de Dio, do de la religia institucio.

Nun Luko aludas ion por ni nekompreneblan. "Petro... (ankoraŭ la malŝata kromnomo), kaj tiuj, kiuj estis kun li ..., (ili ne plu estas kun Jesuo, ili sekvas Petron)"... *estis premataj de dormemo;*" Do ĉe tiu mirinda evento ili dormas. Kial? Dormo montras, ke ili ne komprenas tion, kio okazas.

" Sed vekiĝinte ili vidis la gloron de Jesuo kaj la du virojn, kiuj staris kun Li. Dum ĉi tiuj disiĝis de Li, (do Moseo kaj Elija forlasas Jesuon) Petro ... (li parolas triafoje: laŭ la evangeliistoj, la tria eldiro estas tiu definitiva, do Petro insistas en sia obstino "diris al Jesuo: „Estro, (ne majstro, sed superulo, kiun oni obeu: tia Jesuon opinias Petro) estas bone por ni esti ĉi

*tie! Ni faros tri laŭbojn: unu por Vi, unu por Moseo kaj unu por Elija!'*. Kion signifas la laŭboj? El la tri ĉefaj festoj, karakterizantaj la kulton de Izraelo, nome la Paska Festo, la Pentekosta festo kaj la Festo de la Laŭboj, ĉi lasta estis la plej grava, tiel grava ke la termino "la festo" sufiĉis por indiki ĝin. Tiu festo memorigis la liberigon de la egipta servuto (Lev 23,43): dum unu semajno oni loĝis sub laŭboj (ankaŭ nun tio okazas en Israelo). Laŭ la tradicio, la mesio estas venonta dum la festo de la laŭboj, kaj memorante la antikvan liberigon oni inaŭguros la novan. Do la mesio atendata, tiu de la tradicio, manifestiĝos okaze de tiu festo. Jen kial Petro proponas aranĝon de tri laŭboj: li postulas, ke Jesuo proklamu sin mesio.

Kiam rolas tri personoj, la plej gravan oni situigas en la mezon. Laŭ Petro, la plej grava estas ne Jesuo, sed Moseo, la leĝdonanto: ĉe liaj flankoj estas Jesuo kaj Elija, por plenumigo de la leĝo.

Tuja komento de Luko: "*Sed li ne sciis, kion li diras. Dum li ankoraŭ parolis,, nubo venis....*". La nubo alvenas, kiam Petro estas parolanta! En la Malnova Testamento la nubo simbolas la aktivan ĉeeston de Dio "... *kaj superombris ilin, kaj ili timegis pro tio*". Do la ĉeesto de Dio timigas la disĉiplojn. Strange: Petro, kiam li unuafoje troviĝis antaŭ Jesuo dum la mirakla fiŝkaptado, petis, ke Jesuo foriru el li ĉar li estas pekulo (Lk 5,8); nun, en ĉeesto de Dio, li ektimas. De tiuj du reagoj Luko komprenigas, kiaj obstakloj estas religia tradicio kaj religia ideologio al la kompreno de la Dio vera.

"*Tiam el la nubo venis voĉo proklamanta: „Ĉi Tiu estas mia Filo, mia elektito: aŭskultu Lin'!*" Filo estas ido, kiu similas al la patro ankaŭ en la konduto. Dio proklamas, ke en Jesuo Li estas tute. La lastaj vortoj estas ordono.

Do malaperis Moseo, malaperis Elija: nur Jesuo estas aŭskultinda: jen tio, kion Luko rekomendas al sia komunumo. Oni aŭskultu la mesaĝon de Jesuo. Kion oni legas en la tekstoj de Moseo aŭ en la libroj de la profetoj, oni komparu kun la instruado de Jesuo; se estas akordo, tion oni akceptu; alikaze, tio ne estu konduktregulo por la kristana komunumo.

"*Kaj dum la voĉo ankoraŭ sonis, la disĉiploj konstatis, ke Jesuo estas sola. Ili restis senvorte...*", Senvortaj regule restas la malamikoj de Jesuo "... *kaj al neniu en tiu tago ili rakontis pri tio, kion ili vidis*. Kial ili nenion rakontas? Ĉar ili ne konsentas. Ili seniluziiĝis. Ili volas iun Jesuon laŭ la leĝo de Moseo kaj laŭ la perforta fervoro de Elija. Ili ne akceptas Jesuon sen Moseo kaj sen Elija. Do ili malkonsentas kun Jesuo kaj silentas.

La vojo irota de la komunumo de Jesuo, por kompreni Lian econ, estas ankoraŭ longa.

